LA LAMPIRO

61-a jaro, numero 162, 2020: 2

La intervujo kun José Mauro Progiante

LA BLUA SONĜO

Autor: J.M. Progiante
Editora: Esprima, 2019
Formato: 19 cm, 60 páginas

Capa dura com ilustrações coloridas

Sequência do livro "La malbeno de Tarumo kaj Nurana" com os personagens reunidos, agora na Bélgica, para solucionar um novo mistério envolvendo o roubo de um diamante.

Preço: R$ 39,00

easp.org.br/butiko

LA LAMPIRO

61-a jaro, numero 162, 2020: 2

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sérgio Viana (psviana@terra.com.br)

Grafikaranĝo: Cristovão Rocha Sousa

Revizianto: José Roberto Tenório

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj artikoloj

Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de Marto 1937

Propra Sldejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca

05041-000 São Paulo, SP - Brazilo

Telefononumero: +55 (11) 3862-1183

easp.org.br | contato@easp.br

Jarkotizo por 2020

Simpla membro.....R$ 150,00.

Subtena membro.....R$ 300,00.

Ŝtatinterna membro.....R$ 75,00.

Deĵoroj:
Sabate: 9h - 12h
Escepte en la lasta sabato de ĉiu monato, kiam la deĵoro daŭras de la 9-a matene ĝis la 7-a vespere pro la Kultura Kunveno, kiu okazas posttagmeze (ekde la 16h).

Estraro

Prezidanto: Esmeraldo Alencar Lima

Vicprezidanto: Paulo Sérgio Viana

1-a Sekretarino: José Roberto Tenório

2-a Sekretarino: Sidnéia da Conceição Beall

1-a Kasisto: Conceição Rodrigues

2-a Kasistino: Maria Delza Macabu

Propaganda Direktorino: Genildo Martins Coelho

Konsilantaro

Audino Castelo Branco, Marcos Zlotovich kaj José Mauro Progiante

Anstataŭantoj

Shigueco Takahasi kaj Cristovão Rocha Sousa

ENHAVO

7 Artoj kaj bonfaroj

11 Intervujo

14 Pri Soleco

16 Militreklamo por Esperanto

17 Lingvaj Respondoj

19 Sicilio

22 EASP elektas novan prezidanton; Por Ĉiu Lernejano, Unu Leciono Pri Esperanto

23 Literatura konkurso “Ĥristo Gorov – Ĥrima 2020”; Prokrastita Kongreso en San-Paŭlo

24 Paskaj pripensoj dum la pandemio

25 Historio de la Komputiloj

27 Ĉina Radio Internacia: unu el la juveloj de Esperantujo

29 Librorecenzo; Filmorecenzo

Viktor Moryama

Paroloj de la prezidanto

Sinjorinoj kaj sinjoroj:

EASP estas nia ankro. Ni devas plifortigi ĝin, kaj tion ni povas fari per la kunlaborado de ĉiuj. Nia laboro dependas de vi, asociano; sen vi ĝi ne vivos.

Kion Esperanto donas al ni? Ĝi donas al ni la eblecon batali por la unuiĝo inter la popoloj. EASP volas paroli kun vi ĉiuj. Ni volas ricevi viajn proponojn, opiniojn, ideojn, por ke ni starigu laborplanon. Se vi supozas, ke vi povas nenion fari, tamen eĉ se vi ankoraŭ ne estas flua parolanto de nia lingvo, vi povas helpi, se ni agados kune. La nova estraro komencas nun novan ciklon, kaj ni soifas aŭskulti vin. Bonvolu sonigi vian voĉon! Vi estas la koro kaj pulmo de EASP!

Estu bonvena, returne!

ESMERALDO ALENCAR LIMA

Viktor Moryama

Paroloj de la redaktoro

La dua numero de nia revuo en 2020 aperas meze de pandemio. Tutmonda sufero, certe rezulto de mistraktado de nia homa nutrosistemo, skua sperto por ĉiuj. Ankaŭ por Esperantistoj, kies eventojn oni devas nuligi aŭ prokrasti - interalie la Brazilan Kongreson kaj nian Ŝtatan Kongreson. Kaj plej dolore: ni ne rajtas kunsidi, brakumi, ĝui proksiman ĉeestadon.

Sed ne nur negativa devas esti por ni la pandemio. En nia ĝenerala izoliĝo, ni havas pli da tempo por legado kaj spektado-aŭskultado de la sennombraj interretaj filmetoj kaj podkastoj, kiuj estas al ni disponeblaj. Ĉi-momente, interreto funkcias kiel potenca mildigilo al nia interdistanco. Kaj ni ne forgesu, ke libroj kaj revuoj estas abunde, senpage disponeblaj en interreto. Ni kaptu la okazon!

Ĉi tiu Lampiro 2/2020 estas unu plia materialo por riĉigo de nia izoleco. Bonan legadon!

PAULO SÉRGIO VIANA

Arto kaj Bonfarto

PAULO P. NASCENTES*
(Esperantigis Paulo Sérgio Viana)

Kiamaniere tiu kvaranteno povos helpi nin pliboniĝi? Ĉu estas ia rilato inter Arto kaj bonfarto? Kia? Ĉu sano persona, sed ne socia, ekzistas? Ĉu sano korpa, sed ne mensa? Ĉu la *individuiga proceso* [1] estas individua aŭ kolektiva? Ĉu sano, same kiel la vivo mem, ne estas plurdimensia? Kiel rolas la spirituala dimensio? Kiel rolas Arto – kia Poezio – por onia bonfarto? Pluraj pensuloj agordas pri la graveco de ampleksa vizio, vivosenco, aktiva imago dum la apero, malapero kaj reakiro de sano ja funkcia! Niaflanke la ekzameno koncernu la implican interrilaton de la terminoj de nia titolo, helpe de fakuloj. Sugestas la *Necerteca Principo de Heisenberg* [2], ke Mistero certe daŭros.

Alvenante el la greka diaĵo Psiĥo, laŭ scioj de hermaj antikvaj tradicioj de Grekujo kaj Egiptujo, la *Smeralda Tabulo* [3] listigas sep principojn: I. Mensismo, II. Respondeco, III. Vibro, IV. Polareco, V. Ritmo, VI. Kaŭzo kaj Efiko, VII. Genro. Ni revenos al ili. Latine *Psiĥo* estas *Animo*, nia nemateria kontraŭparto. Carl Gustav Jung, kuracisto, antropologo, esploristo, kreinto de la Analiza Psikologio, trinkis el fontoj kiaj Hermesismo, Alĥemio, filozofio de la Antikva Ĉinujo. Konceptoj pri psiĥa energio, konscio, persona kaj kolektiva nekonscio, ombro, komplekso, egoo, persono, arketipo, Si mem (*Self*) influas sur la individuigan proceson. Kio estas tio?

Unue ni pensu pri bebo, vivanta esto dependa de la patrino, tute ne konscia pri si mem, pri sia ekzisto aparte de ia ĉirkaŭanta tutaĵo. Nur iom post iom ĝi ekkonscios pri io tia kia la patrino. Eĉ post la apero de la parola lingvaĵo, infano mencias pri si mem kiel bebon, aŭ uzas sian propran nomon. "Mi" estas pronomo aperonta poste en frazoj menciantaj tiun, kiu parolas kontraste la ceterajn parolantojn. Individuigo estas fariĝi konscia pri tiu, kiu vere oni estas. Tio implikas ian lumigon pri nekonataj, rifuzitaj, malakceptaj kaj ombraj partoj de oniaj spertoj. Estas psiĥaj enhavoj, kiujn la komplekso de la egoo ne volas vidi, cele eviti la konfronton ne nur kun la ombro, laŭ *strikta senco*, sed ankaŭ kun kreivaj partoj same retenitaj dum la kultura, socia, eduka proceso. "Ĉio kion la homa spirito kreis ŝprucis el enhavoj, kiuj lastanalize estis nekonsciaj ĝermoj." (Jung, 2013: 321). Li klarigas, ke

"tiun sferon de nia psiĥa heredaĵo mi nomis *kolektiva nekonscio*". (*Ibid.*). Individuiga proceso signifas do konfronti kaj integri en la konscio nekonsciajn ombrajn enhavojn, maskojn aŭ personojn per kiuj ni fariĝas socie konataj. Individuigo tamen havas flankon socian kaj komunuman. Nur kune kun la ceteraj homoj ĝi okazas.

Kiam Jung avertas, ke ĉiuj niaj spertoj estas psiĥaj eventoj, do mensaj, rimarkindas la kongruo kun la herma unua principo, nome Mensismo, laŭ kiu "la Tuto estas Menso, la Universo estas Menso". La dua principo, Respondeco, asertas, ke "ĉio, kiu estas supre estas kiel tio, kio estas malsupre, kaj tio, kio estas malsupre, estas tiel kiel estas supre". Fakte estas kompletiga kaj komplementa la rilato inter konscio kaj nekonscio, *anima* kaj *animus*, principoj maskla kaj ina de la psiĥo. Same do rolas la principoj de Vibro, Genro kaj Polareco. Analogio ekzemple ekestas kiel principo en metaforo kaj simbolo. Elveninte el profundaj tavoloj de nekonscio, ĝenerale alireblaj per sonĝoj, kreiva imago, simbolaj asocioj, Arto mistere eniras nian konscion kiel esprimpovo pri neesprimeblaĵoj! Jen ĉi tie la kerno de poeziverkado: diri nedireblaĵojn! Poezio ĉioepoka estas tiom grava por popoloj kaj civilizo, ke grandaj poetoj donacas siajn proprajn nomojn al la historia lingvo de ilia poeziumado. Ne hazarde, la portugala lingvo nomiĝas la lingvo de Kamono; la lingvo de Danto estas la itala; la lingvo de Cervanto, la hispana kaj la angla nomiĝas lingvo de Ŝekspiro. Pri poezio tamen priparolu la meksika poeto kaj teoriisto Octavio Paz, aliaj poetoj kaj precipe tiuj, kiuj donas voĉon al la Poezio por paroli pri ĝi mem, la tiel nomata metapoezio.

Sen la pretendo fermi la aferon, Jung (2018) klarigas: "La sekreto de la arta kreado kaj de ĝia agado konsistas en tiu eblo remergi en la originan kondiĉon de la *participation mystique*, ĉar en tiu plano ne estas la individuo, sed la popolo kiu vibras pro la spertoj; ne temas plu nun pri ĝojoj kaj doloroj de la individuoj, sed pri la vivo de la tuta homaro. Tial la majstroverko estas samtempe objektiva kaj nepersona kaj tuŝas nian plej profundan eston." Siavice, Paz (2015), en la ĉapitro "Signoj en rotacio", komprenigas nin pri la moderna koncepto pri Poezio kaj la rolo de la poeto en la nuntempa socio: pro la historiaj kondiĉoj, restas al la Poezio hodiaŭ precipe metalingva sinteno. Tial nuntempe tiom da poemoj estas *metapoemoj*. Pri la nuntempa liriko Paz asertas:

> La poezio estas la rivelado de la homa kondiĉo kaj la konsekro de konkreta historia sperto. La modernaj romano kaj teatro sin apogas en sia epoko, eĉ kiam ĝin neas. Dum tiu neado ili ĝin konsekras. La destino de la liriko estis

> diversa. Post la morto de la antikvaj diaĵoj, kaj la propra objektiva realaĵo neata, la poemo havas nenion plu por prikanti, escepte sian propran eston. La poeto kantas la kanton mem. Sed la kanto estas komuniko. Al la monologo ne povas sekvi alia afero ol la silento, aŭ aventuro inter ĉiuj malpreparata kaj ekstrema: la poezio ne plu enkarniĝos en la vorto, sed ja en la vivo. La poezia vorto ne konsekros la historion, sed estos historio, vivo. (2015: 74).

Tio okazas kvazaŭ la lirika poeto sin sorbigus je nova misio, aŭ al si atribuus novan taskon dum la alfronto al la realo de sia tempo. Bona klariga ekzemplo pri metapoemo estas tiu de la gaŭĉa poeto Mario Quintana:

> Poemoj estas birdoj alvenantaj/ oni ne scias de kie kaj eksidas/ sur la libron kiun vi legas.// Kiam vi fermas la libron, ili ekflugas/ kvazaŭ de plank-pordo.// Ili ne havas rifuĝejojn/ nek havenon;/ momente ili sin nutras en ĉiu/ manparo kaj foriras.// Kaj do vi rigardas tiujn viajn malplenajn manojn,/ je l' rava surprizo scii,/ ke ilia nutro estis jam ene de vi. (QUINTANA, 1983).

Abundas simboloj. "Birdoj", "ekflugo", "haveno" simbolas liberon. Rava surprizo iel samas. La imagoj kaj metaforoj sugestitaj de la poemo, ĝia origino, destino daŭras mistero, ĉar ili alvenas el la nekonscio – persona kaj kolektiva. Sed, kiam ili tuŝas la subjektivecon de la leganto ekvidiĝas, ke ilia nutro jam estis en ŝi/li. Do ili enestas en la nekonscio de la poeto, de la leganto. La kolektiva nekonscio inkludas poeton, leganton, tempospiriton ilian kaj de estontuloj. Cele al malvualigo de la mistero, aliaj poetoj sekvos per aliaj nesatigaj formuloj por liberigi el la anima kaptilo *birdojn*. Nekontrolitaj, tamen, birdoj daŭre *ekflugos, senhalte, senhavene*. Surprize estas, ke ordinaraj ĉiutagaj verbaj signoj, uzataj dum komerca, proza, utila konversacio akiras statuson de arto ĉemane de kreivaj poetoj kiaj Drummond, Fernando Pessoa, Manuel Bandeira, kelkaj el ni, kiuj el tiuj vortoj igos poezian signon. El kie devenas tiu poezieco kiu nin atingos kiel pripensoj, memoroj, revoj, fantazioj, eble memkono kaj memtransformo?

Se tiu menciita poezifarado iel influas aŭ ne sur nian individuigan proceson decidu mem la leganto. Fakto estas, ke al la plejparto de poetoj, faras neniun sencon ne verki ion tiam, kiam nekonata komplekso aŭ malsuspekta arketipo, kia tiu de demiurgo, nin kaptas kaj ĵetas sur la misteran sinon de tutpova kreadopovo.

Permeson mi petas por provizore fini ĉi tiun artikolon instigante al samtema pripenso aliajn poeziemulojn: bv. priverki ankaŭ vi. Kial ne? Jen poemo rikoltita el mia dulingva blogo:

https://paposnascentes.com

POEMO DE LA VERKADO

verkas mi pro tiu mallum'/ do mi lumas/ verkas mi pro nesci'/ do mi nomumas/ verkas mi kaŝite/ sub noktohaŭt'/ do mi prifosas jukas ĉasas/ vortojn poemon imagojn/ verkas mi pro via instigo/ per viaj legadoj/ al freŝaj esprimtorturoj/ verkas mi ĉar min kuracas/ la vorto ties serĉo kaj kulturo/ verkas mi ĉar inventas min/ la inventado de mi teksata/ kaj jen mi/ Aŭtoro de mia disa eldiro:/ ombro sufokata ĉiuverse/ verkas mi finfine pro la volo/ surprizigi dum ebla legado/ la kialon de ĉi liberigo/ plu min sklavigi/ verki verki verki senfine/ per furioza memkavado.

Referaĵoj

JUNG, C. G. A natureza da psique. Trad. Mateus Ramalho Rocha. 10 ed. Petrópolis, RJ: Vozes, 2013.

¬¬¬_____. A energia psíquica. Trad. Maria Luiza Appy. 14 ed. 7ª reimpr. Petrópolis, RJ: Vozes, 2017.

_____. O espírito na arte e na ciência. Trad. Maria de Moraes Barros. 8 ed. 9ª impr. Petrópolis: Vozes, 2018.

NASCENTES, P. P. https://paposnascentes.com/2012/04/poema-do-escrever.html#links. Aliro la 8an de aprilo 2020.

PAZ, O. Signos em rotação. Trad. Sebastião Uchoa Leite. Org. e rev. Celso Lafer e Haroldo de Campos. São Paulo: Perspectiva, 2015.

QUINTANA, M. Poesia completa. Rio de Janeiro: Nova Aguilar, 1983.

TRÊS INICIADOS. O Caibalion: estudo da filosofia hermética do antigo Egito e da Grécia. Trad. Rosabis Camaysar. 22ª impr. São Paulo: Pensamento: Cultrix, 2015.

---

[1] Iĝi konscia pri ĉiu persona kaj kolektiva nekonscia enhavo, manifesti la instancon nome Si mem (*Self*) aŭ Tuteco, t.e., la *Imago Dei*.

[2] Ĝi asertas, ke ne eblas samtempe scii kaj la percizan pozicion kaj la movokvanton de partiklo. La principon unue eksciis Wolfgang Pauli per letero de Werner Heisenberg en februaro 1927.

[3] Cf.: TRÊS INICIADOS, 2015.

Intervujo

José Mauro Progiante

Li estas 59-jara, naskiĝis en Catanduva/SP kaj loĝas en Bauru/SP. Diplomita pri elektra inĝenierarto kaj poste pri juro. Fiskinspektoro preskaŭ emeritiĝanta. Baldaŭ li laboros kiel advokato. Konata preleganto en Esperanto-eventoj kaj artikolisto, lastatempe li sin dediĉas al infanliteratura verkado.

1. Lastatempe vi estis premiita en la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio en la kategorio "Infanlibro de la Jaro". Ĉu vi bonvolu raporti al ni pri tiu via sperto?

En la jaro 2017 mia infanlibro "La Malbeno de Tarumo kaj Nurana" estis eldonita de Esperanto Asocio de San-Paŭlo (EASP). En julio de la sekva jaro, dum la Universala Kongreso, okazinta en Lisbono, tiu libro dividis la unuan premion en la Belartaj Konkursoj kun la verko "Tikiriki Tok el Strobilo", de la ruman-izraela verkistino Luiza Carol. Fakte la premio aljuĝita en la branĉo "Infanlibro de la Jaro" apartenas al la eldonejo, ĉar la juĝantoj taksas la tutan eldonaĵon, kio inkluzivas la kovrilon, la internajn ilustraĵojn, la grafikan aranĝon ktp., do ne nur la tekston. Mi estas certa, ke tiu premio ne ekzistus sen la kontribuo de Mariana Hortolani Rodrigues, kiu kreis la ilustraĵojn; de Paulo Sérgio Viana, kiu faris la revizion; de José Roberto Tenório, kiu ankaŭ helpis en la revizio, krom respondeci pri la enpaĝigo kaj presado; kaj de aliaj homoj iel kunlaborintaj por la eldono.

2. Ĉu vi verkas por infanoj ankaŭ en la portugala lingvo?

Jes, miaj originalaj tekstoj por infanoj estas en la portugala lingvo. "La Malbeno de Tarumo kaj Nurana", ekzemple, estas esperanta versio de la portugallingva "A Maldição de Taruma e Nurana". Ankaŭ la originalan tekston de mia dua

porinfana libro, “Blua Sonĝo en Antverpeno”, mi verkis portugale.

3. Oni diras, ke vi interagas kun lernejoj per viaj literaturaĵoj. Kiel tio funkcias?

Multaj lernejoj, publikaj kaj privataj, starigas programon de legado por siaj lernantoj, devigante, ke ili legu kelkajn literaturajn librojn dum la lernojaro. Mi faras kontakton kun la pedagogo de la lernejo, kiu respondecas pri la elekto de la legotaj libroj kaj proponas, ke li adoptu miajn librojn en la programo. Por veki intereson, mi liveras ankaŭ helpilon por la instruisto, proponante diskuttemojn, aktivecojn ktp.
Kvankam mi ankoraŭ ne faris amasan reklamon, kelkaj lernejoj jam akceptis mian proponon kaj mi vizitis ilin por paroli kun la lernantoj. Tia sperto montriĝas ambaŭflanke kontentiga: por la lernantoj, kiuj ĝuas la ĉeeston de la aŭtoro, kaj por mi, pro la oportuno montri miajn verkojn kaj senti la afablecon de la infanoj.

4. Ĉu vi verkas ankaŭ por neinfana publiko?

Krom porinfanaj tekstoj, mi skribas rakontojn pretende literaturajn, en la portugala. Kelkaj el ili estas en antologioj kaj manplenon mi kunigis kaj publikigis libroforme, kun la titolo “Abdo Fariz e outras lembranças” (“Abdo Fariz kaj aliaj rememoroj”).
Cetere mi laŭeble verkas en Esperanto nefikciajn artikolojn, pri diversaj temoj. Ĉi tiu revuo regule aperigas ilin.

5. Kio kondukis vin al porinfana literaturo?

En miaj junaj aĝoj mi estis admiranto de brazilaj aŭtoroj, kiuj verkis por infanoj kaj adoleskantoj (Monteiro Lobato, Francisco Marins kaj aliaj), kaj de eksterlandanoj, kies libroj estis tradukitaj kaj enestis en kolekto nomata "Jovens do mundo todo" ("Junuloj el la tuta mondo"), publikigita de Eldonejo Brasiliense. Poste, kiam mi iĝis patro de tri infanoj, mi devis preskaŭ ĉiunokte rakonti historiojn por dormigi ilin. Multajn mi mem elpensis kaj kompreneble mi aĉetadis porinfanajn librojn por satigi ilian scivolon. La fakto estas, ke mi ĉiam estis ĉirkaŭata de tiaj literaturaĵoj. Dum multaj jaroj mi volontulis en senprofita klubo kreita por disvastigado de libroj al infanoj. Nia laboro estis elekti taŭgajn librojn inter la disponeblaj en la merkato, aĉeti, paki kaj sendi ilin al centoj da registritaj familioj, kiuj pagis nur la koston. Kaj dum tri jardekoj mi estis fakdelegito de UEA pri porinfana literaturo. Ŝajnas do, ke verkado de libroj por infanoj estas natura konsekvenco en mia vivo.

6. Parolu iomete pri via plej nova libro.

Mia plej nova libro ankoraŭ estas lanĉota, ĉar mi atendas, ke la ilustrantino finu sian parton. Mi skribis ĝin en la portugala kaj nun mi laboras en la esperanta versio. Mi povas diri nur, ke temas pri nova aventuro de la infanoj de miaj du antaŭaj libroj, ĉifoje en Budapeŝto. La plej nova jam publikigita estas la libro "Jacara, o jacaré solitário" ("Jacara, la soleca aligatoro"). La teksto en Esperanto jam estas preta kaj mi intencas lanĉi ĝin baldaŭ, almenaŭ ciferece. Ĝi estas tute ilustrita, taŭga por etaj infanoj. Temas pri aligatoro, kies vosto estas multe pli granda ol normale. En la komenco tio estas amuza, sed iom post iom fariĝas suferiga, ĝis kiam... Ĝia legado ebligas paroli kun la infanoj pri diferencoj inter la individuoj kaj la ĝusta sinteno antaŭ tiu fenomeno. ■

Pri Soleco

CECÍLIA MEIRELES*
Esperantigis (Paulo Sérgio Viana)

Genevieve Naylor

Multaj homoj suferas solecon. Sufiĉas, ke ĉirkaŭ ili fermiĝas silento, ke montriĝas antaŭ iliaj okuloj neniu homa estaĵo, kaj ilin ekposedas ega angoro: kvazaŭ el horizontoj stariĝas la fino de la mondo.

Tamen, ĉu fakte ekzistas surtere vera soleco? Ĉu ni ĉiuj ne estas ĉirkaŭataj de sennombraj objektoj, de senformaj aĵoj de Naturo kaj ĉu nia privata mondo ne estas plena de rememoroj, de revoj, de cerbumado, de ideoj, kiuj malebligas kompletan solecon?

Ĉio vivas kaj ĉio parolas ĉirkaŭ ni, kvankam per vivo kaj voĉo nehomaj, sed kiujn ni povas lerni kaj aŭdi, ĉar ofte tiu sekreta lingvo helpas klarigi nian propran misteron. Kiel tiu Sultano Mamude, kiu komprenis la parolon de birdoj, tiel same ni povas apliki nian tutan sentemecon al tiu ŝajna malpleno de soleco: kaj iom post iom ni sentos riĉiĝon.

Pentristoj kaj fotistoj rondiras ĉirkaŭ objektoj, serĉante angulojn, lumefektojn, elokventon de formoj, por elmontri tion, kio ŝajnas al ili la plej senmovaj el iliaj aspektoj, sed ankaŭ la plej komunikeblaj; la plej

sugestiriĉaj, la plej kapablaj transdoni tion, kio transpasas la fizikan limon de tiuj objektoj kaj iamaniere konsistigas ilian spiriton, ilian animon.

Ni fariĝu do spiritvidantoj: ni malrapide rigardu la kolorojn de muroj, la desegnon de seĝoj, la travideblecon de vitraĵoj, la dolĉajn tolaĵojn senpretende teksitajn. Ni serĉu en ili ne la belecon, kiu tuj altiregas la rigardon, la ekvilibron de linioj, la gracion de proporcioj: ofte ilia aspekto - same kiel ĉe homaj estuloj - estas maloportuna kaj seneleganta. Sed ne nur tion ni serĉas: ja ilian intiman sencon ni klopodas distingi. Ni amu en tiuj simplaj aĵoj la kvanton da spertoj, kiujn ili reprezentas, kaj la senteblan resonadon en ili de tiom da homa laboro, tra senfinaj jarcentoj.

Ni amu en tiuj variaj aĵoj tion, kion ni sentas pri ni mem, ĉar estante egoistoj, ni scias ami nur tion, kio koncernas nin. Ni amu la antikvan ensorĉiĝon de niaj infanaj okuloj, kiam ili komencis malkovri la mondon; la nervurojn de ligno, kun iliaj vojoj de boskoj kaj ondoj, kaj horizontoj, la desegnon de kaheloj, la emajlon de fajencoj; la trankvilajn, regulajn tegmentojn... Ni amu la murmuradon de kuranta akvo, la sonojn de maŝinoj, la malkvietan voĉon de bestoj, kiun ni emus traduki.

Ĉio pulsas ĉirkaŭ ni, kaj kiel amdevon ni apliku orelon, okulon, koron al tiu senfina kvanto da naturaj aŭ artefaritaj formoj, kiuj gardas sian sekreton, siajn rememorojn, siajn silentajn spertojn. Rozo, kiu adiaŭas sin mem, spegulo, kie staras nia vizaĝo. La kusentegaĵo, kie desegniĝas la sonĝoj de dormanto, ĉio, ĉio estas mondo kun pasinteco, nuntempo kaj estonteco, laŭ kiu ni vojiras, atenteme aŭ distrite. Delikata mondo, kiu ne trudas sin perforte; kiu akceptas nian facilanimecon aŭ nian respekton; kiu atendas, ke ni eltrovu ĝin, sen sinanonco kaj sen pretendo superregi; kiu povas resti ĉiam ignorata, kaj tamen daŭre plu ekzistadas; kiu ne faras sian ĉeeston la postulema reklamo "Jen mi! jen mi!". Sed, per koncentriĝo en sia esenco, ĝi elmontriĝas nur tiam, kiam niaj sentumoj kapablas ĝin eltrovi. Kaj kiu silente proponas al ni sian multoblan, grandaniman, nevideblan kompanion.

Ho, se vi plendas pri homa soleco, tiam atentu pri tiu prestiĝa ĉeesto ĉirkaŭ vi, pri tiu abunda lingvaĵo, kiu elverŝiĝas el ĉio, kaj por ĉiam babilos kun vi. ■

Militreklamo por Esperanto

JAMES R. PITON

"Feldpost", aŭ (milit)kampa Poŝto, estis la nomo en la germana porŝtata servo al soldatoj dum milito. Tiuj, same kiel la familioj, havis senpagan afrankon por kelkaj korespondaĵoj ĉiumonate.

Iuj organizaĵoj provizis la materialon por tiu korespondado. Ekzemplo estas tiu ĉi poŝtkarto, senpage disponigita de Esperanto-Zentrale en Dresdeno (Germanio). Ĝi estis uzita en januaro 1915. Do apenaŭ 5 monatojn post la deklaro de la Unua Mondmilito, dresdenaj esperantistoj hastis provizi tiun reklamilon. Ankaŭ en Italio multenombraj estis tiaj kartoj provizitaj de esperantistoj al la publiko.

En la detalo oni vidas la tekston de la reklamo: "La Internacia Helplingvo Esperanto povas fari valorajn servojn al niaj soldatoj eksterlande. En ĉiu granda urbo estas Esperanto-parolantoj kaj tiel la interkompreniĝo per Esperanto povas esti pli rapida ol en la loka lingvo. Soldatoj, ekkonu Esperanton! Klarigan materialon volonte senpage disponigas la E-Centro Dresdeno."

Ne tute surprize ĉar la esperantistoj de la germana Dresdeno tiam estis tre aktivaj. La Kvara Universala Kongreso de Esperanto tie okazis (1908). En 1911 la Internacia Higiena Ekspozicio havis reklamilojn ankaŭ en Esperanto. En 1915, dum malfacilaj militaj tempoj, ili montris, ke esperantistoj emas partopreni en siaj komunumoj (aŭ devus tion fari). Kaj tio restu ekzemplo por ni. ■



Lingvaj Respondoj

FRANCISCO S. WECHSLER

Ĉu uzi la N-finaĵon post sidiĝi/eksidi sur kaj kuŝiĝi/ekkuŝi sur?

Demando

Kelkaj aŭtoroj skribas *sidiĝi sur seĝon*. Aliaj, *sidiĝi sur seĝo*. Kiu estas la ĝusta? Simile pri la verbo *kuŝiĝi*: ĉu *kuŝiĝi sur liton* aŭ *kuŝiĝi sur lito*?

Respondo

Ambaŭ formoj estas ĝustaj, sed kun diferenco nuanca. Zamenhof ordinare ne uzis la N-finaĵon de direkto, sed ja troveblas kelkaj ekzemploj liaj kun ĝi. Ĉe aliaj aŭtoroj, precipe la pli modernaj, oni trovas la N-finaĵon iom pli ofte.

La nuancan diferencon inter la du formoj klarigas *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* (Wennergren, 2019):

La verbo sidiĝi *precipe esprimas ŝanĝon de korpopozicio, ne movon, kaj tial Zamenhof preskaŭ ĉiam uzis ĝin sen N-finaĵo por direkto. Sed se oni volas esprimi aŭ emfazi, ke la sidiĝanto moviĝas al la sidloko, oni ja povas diri* sidiĝi sur seĝon, sidiĝi en fotelon, *k.s.*

(Kompreneble, la samo validas por *eksidi, kuŝiĝi* kaj *ekkuŝi*.)

Jen Zamenhofaj ekzemploj kun la N-finaĵo:

Falinte de l' supro de l' arbo, li **sidiĝis sur** *la malsupran branĉon.* (*Dua Libro, 1888*)

La ĉevaloj staras selitaj, vi povas **sidiĝi sur** *ilin kiam vi volas.* (*La Rabistoj,* 1908)

Ĉiuj servistoj estis malsupre sur la korto, por vidi, kiel ili **sidiĝas sur** *ĉevalon.* (*Fabeloj de Andersen 3,* 1912)

Jen li […] trapaŝis la belegajn kampojn de la hejmo, sed poste li **sidiĝis sur** *struton […]*

Ili **kuŝiĝas sur** *la teron kaj ekdormas.* (*La Rabistoj,* 1908)

Kaj vi **kuŝiĝu** *sur vian maldekstran flankon […]* (*Malnova Testamento,* 1916)

Kiam vi tion plenumos, tiam denove **kuŝiĝu sur** *vian dekstran flankon […]* (*Malnova Testamento,* 1916)

Sed Zamenhof multe pli ofte forlasis la N-finaĵon, kiel en la jenaj ekzemploj:

Poste ŝi **sidiĝis sur** *la tirkesto kaj pensis […]* (*Fabeloj de Andersen 1,* 1909)

La virino […], farinte kelke da paŝoj, **sidiĝis sur** *la kanapeto.* (*Marta,* 1910)

Kaj leviĝis Rebeka kaj ŝiaj servistinoj kaj **sidiĝis sur** *la kameloj […]* (Malnova Testamento, 1916)

[…] poste ŝi **sidiĝis sur** *la planko apud la patrino,* **kuŝiĝis sur** *ŝiaj genuoj […]* (*Marta,* 1910)

Kaj Samuel iris kaj **kuŝiĝis sur** *sia loko.* (*Malnova Testamento*, 1916)

Kaj Joaŝ ekdormis kun siaj patroj, kaj Jerobeam **eksidis sur** *lia trono.* (*Malnova Testamento*, 1916)

Jen kelkaj ekzemploj kun la N-finaĵo verkitaj de aliaj aŭtoroj:

Sinjorino Anneto singardeme **sidiĝis sur** *la kanapon […]* (*Fundamenta Krestomatio,* 1904)
Poste, tre laca, ŝi **kuŝiĝis sur** *liton […]* (*Fratoj Grimm – Elektitaj Fabeloj,* Kabe, 1906)
[…] Herhor **sidiĝis sur** *ĉevalon […]* (*La Faraono,* Kabe, 1907)
Kaj al ili aperis disirantaj langoj kvazaŭ el fajro, kaj **sidiĝis sur** *ĉiun el ili.* (*Nova Testamento,* 1916)
Ili dume, ekaŭdinte la levitan voĉon de Crispus, […] **sidiĝis sur** *ŝtonan benkon.* (*Quo Vadis,* Lidja Zamenhof, 1933)
Dirante ĉi tion, li **kuŝiĝis sur** *benkon antaŭ la tablo […]* (*Quo Vadis,* Lidja Zamenhof, 1933)
Li **sidiĝis sur** *ŝtonon apud ili […]* (*Infanoj en Torento,* Engholm, 1934)
Poste ili **kuŝiĝis sur** *la herbon proksime al la akvo.* (*Infanoj en Torento,* Engholm, 1934)
Mi **sidiĝis sur** *la rapidvagonaron […]* (*Vojaĝo al Kazohinio, Szathmári*, 1938)
Li bruligas ŝin per la alumeto […], **sidiĝas sur** *la sofon.* (*Vespera ruĝo anoncas ventegon,* Szilágyi, 1950)
Li **kuŝiĝas sur** *la sofon.* (*Vespera ruĝo anoncas ventegon,* Szilágyi, 1950)
Li **ekkuŝis sur** *la liton, kaj ŝi apude.* (*Ĉu ŝi mortu tra-fike?,* Piron, 1982)
Ambaŭ **sidiĝis sur** *rokojn.* (*Ĉu rakonti novele?,* Piron, 1986)
[…] li **eksidis sur** *domsojlon, en pordangulo.* (*Ĉu rakonti novele?,* Piron, 1986)
Li tusis kaj **eksidis sur** *la pli malproksiman ekstremon de ŝia benko.* (*La majstro kaj Margarita, fragmentoj,* Pokrovskij, 1991)
[…] nun ni **sidiĝis sur** *la herbon por ĝui grandiozan feston.* (*La Ŝtona Urbo,* Löwenstein, 1999)

Fine, jen kelkaj ekzemploj sen la N-finaĵo de direkto, verkitaj de aŭtoroj krom Zamenhof. Tiaj formoj estas pli oftaj, eĉ modernepoke:
Li **sidiĝis sur** *la seĝo antaŭ la piano […]* (*Fundamenta Krestomatio*, 1904)
[…] la ŝipo **kuŝiĝis sur** *flanko […]* (*Fundamenta Krestomatio*, 1904)
[…] fine li volis dormi kaj **ekkuŝis** *sur la planko […]* (*Fratoj Grimm – Elektitaj Fabeloj,* Kabe, 1906)
La princo sin banis, kaj **kuŝiĝis sur** *la mola lito […]* (*La Faraono,* Kabe, 1907)
[…] la profeto **sidiĝis sur** *la montrita al li loko […]* (*La Faraono,* Kabe, 1907)
[…] li elkondukis Jesuon, kaj **sidiĝis sur** *tribunala seĝo […]* (*Nova Testamento,* 1916)
Lemuel **kuŝiĝis sur** *amaso da velaĵo en angulo de la ĉambro […]* (*Pro Iŝtar,* Luyken, 1924)
[…] Karlo ekkuŝis sur la herbo kaj bruligis sian pipon. (*Al Torento,* Engholm, 1930)
[…] li ordonis fosi por si kavon kaj **kuŝiĝis sur** *la tero […]* (*Quo Vadis,* Lidja Zamenhof, 1933)
[…] multaj jen **ekkuŝis sur** *siaj ventroj, jen suprensaltadis […]* (*Vojaĝo al Kazohinio,* Szathmári, 1938)
Mi **sidiĝis sur** *seĝo iom flanke.* (*Kredu min, sinjorino!,* Cezaro Rossetti, 1949)
[…] mi reiris al la stacidoma atendejo, **kuŝiĝis sur** *la planko […]* (*Kredu min, sinjorino!,* Cezaro Rossetti, 1949)
Oni **sidiĝis sur** *la mola herbokovro.* (*Mia penso,* Kalocsay, 1957)
Ili **kuŝiĝos sur** *matracoj teksitaj el smilako kaj mirto […]* (*La Respubliko,* Broadribb, 1993)
Mi deziregis **ekkuŝi sur** *la grundo kaj dormi […]* (*La Ŝtona Urbo,* Löwenstein, 1999). ■

Sicilio

HERBERT WELKER

Sicilio, en la plej suda parto de Italio, estas la plej granda insulo en Mediteraneo. Kun 25.800 km^2 ĝi estas iomete malpli granda ol la subŝtato Alagoo. Estante insulo, ĝi havas longan marbordon, ĉirkaŭ mil kilometrojn, sed, kontraŭe al Brazilo, ne ekzistas multaj sablaj plaĝoj. Aliflanke ĉe la plaĝoj, sur kiuj graveloj anstataŭas sablon, la mara akvo estas kristalece blua. Kaj tie, kie la marbordo situas proksime al montaro, oni povas – sur ŝoseoj inter maro kaj montaro - ĝui belegajn panoramojn.

Menciindas evidente ke sur la insulo troviĝas la plej granda kaj plej aktiva vulkano de Eŭropo, Etno, kiu altas 3.274 metrojn.

Ankoraŭ pli ol la naturo alogas la kulturaj vizitindaĵoj, ĉefe pro tio, ke la insulo havas longan historion kun influoj de diversaj kulturoj. Mi prezentas mallongan resumon:

Ekde la 8-a jarcento koloniigis Sicilion la fenicoj, aparte la kartaganoj, kiuj fondis i.a. Palermon (hodiaŭ la plej granda sicilia urbo). Iomete poste alvenis la grekoj, kiuj venkis la kartaganojn en 480 a.K.. Ekde tiam floris la greka kulturo sur la insulo, kiu iĝis tre riĉa kaj estis nomita "*Magna Graecia*" (Granda Grekio).

La kartaganoj daŭre vivis en la okcidenta kaj norda partoj de Sicilio, sed ili estis venkitaj de la romianoj en la 3-a jarcento a.K., kaj Romio konkeris la tutan insulon, kiu iĝis kvazaŭ "grenejo" de Romo dum kelkaj jarcentoj.

Post la falo de la Okcident-Romia Imperio je la fino de la 5-a jarcento p.K. okupis Sicilion vandaloj kaj ostrogotoj, sed post malmulte da tempo ili estis venkitaj de Bizancio (aŭ Orienta Romia Imperio, kies ĉefurbo estis Bizanco, poste nomita Konstantinopolo, hodiaŭ Istambulo), kaj ĝia greka kulturo revenis al la insulo.

En 827 Sicilio estis invadita de arabaj islamanoj, kiuj regis la insulon proksimume dum du jarcentoj. Meze de la 11-a jarcento du trionoj de la enloĝantoj de Sicilio estis islamanoj.

Tiam - pli ekzakte en 1061 – normanoj (originaj el Skandinavio kaj poste establitaj en Normandio, norda Francio) konkeris la insulon, sed ili formis nur la superan tavolon. La ordinara popolo estis miksaĵo de la grek-bizanca loĝantaro kaj de la islamaj araboj. Ankaŭ ĉe la kortego okazis dum kelka tempo simbiozo: la normanajn reĝojn ĉirkaŭis grekaj kaj

arabaj konsilistoj, kaj eĉ elektis registarajn sloganojn el Korano. En la arkitekturo estiĝis la tiel nomata normana-araba-bizanca stilo, kiu estas miksaĵo de romanikaj, arabaj kaj bizancaj elementoj.
En 1194 komenciĝis en Sicilio la mallonga regado de la germana dinastia Hohenstaufen ĝis 1266. Sekvis franca, hispana kaj alia franca dinastioj (Anĵuo, Aragono, Burbono). Ekde 1860/1861 la insulo apartenas al Italio, unue al la Reĝlando Italio (kiu ekzistis ĝis 1946) kaj poste al la Respubliko Italio.
Menciindas ke en 1140 la normanoj konkeris sudan kaj mezan kontinentan Italion ĝis norde de Napolo kaj ke tiu regiono poste apartenis al la Reĝlando Sicilio, inkluzive sub la regado de la dinastio Hohenstaufen. En 1282 okazis popola ribelo konata kiel "Sicilia Vespro" (pri kiu Verdi komponis samnoman operon) kaj estiĝis Reĝlando Napolo flanke al Reĝlando Sicilio. En 1816 la du regnoj unuiĝis, sed estis adoptita la stranga nomo "Reĝlando de la Du Sicilioj". Ĝi ekzistis ĝis 1860.
Bone, post tiu resumeto de la historio mi rivelu kiuj estas la ĉefaj kulturaj vizitindaĵoj. Vidu jenan liston:
El la greka periodo:

- la teatroj en Sirakuzo (unu el la plej grandaj grekaj teatroj, sufiĉe bone konservita) kaj Taormino (kie la greka teatro, situanta sur alta kruta monto, kun vido al la maro, estis grandparte rekonstruita de la romianoj);
- du belaj temploj (kaj kelkaj ruinoj) en Agriĝento, pli-malpli bone konservita templo en Segesta kaj grandaj restoj de temploj en Selinunte.

El la romia periodo:

- granda anfiteatro en Sirakuzo kaj en Katanio.

El la normana periodo viziteblas pluraj ĝemoj de la normana-araba-bizanca arkitekturo (kelkfoje nomata "sicilia romanika stilo"), precipe en Palermo:
- kelkaj malgrandaj preĝejoj (kiuj havas tipe arabajn kupolojn kaj tipe bizancajn pentraĵojn aŭ mozaikojn): Santa Maria dell' Ammiraglio, San Cataldo, San Giovanni degli Eremiti;
- la mirinde belegaj Palaca Kapelo de Palermo kaj la katedralo de Monreale (proksimege al Palermo), kiuj plenas de bizancaj mozaikoj.

En 2015 UNESKO deklaris la araban-normanan parton de Palermo kune kun la katedralo de Monreale kaj tiu de Cefalú (80 kilometrojn for de Palermo) Monda Kulturheredaĵo.

Al la romanika stilo sekvis en multaj eŭropaj landoj la gotika kaj poste la renesanca stilo, sed ne en Sicilio. Tamen baroko estas fortega sur la insulo. En 1693, dum la regno de la reĝoj de Aragono, okazis en orienta kaj suda Sicilio, en regiono nomata "Val di Noto", tertremo kiu mortigis 60.000 homojn kaj detruis plurajn urbojn. Post tio la reĝo rekonstruigis multajn preĝejojn laŭ baroka stilo, tiel ke ili estas unuflanke iomete similaj kaj aliflanke belegaj. Oni povas nomi:

- la preĝejon Collegiata en Katanio;

- la katedralon de Sirakuzo;

- preĝejojn (kaj aliajn konstruaĵojn) en pliaj ses urboj de la "Val di Noto", el kiuj la plej belaj troviĝas en Modica, Noto kaj Ragusa.

La ok barokaj urboj de tiu regiono estis deklaritaj de UNESKO en 2002 Monda Kulturheredaĵo.

Sendube, kara leganto aŭ legantino, vi bone konas la Esperantan Vikipedion. Bonŝance en ĝi vi povas legi artikolojn pri multe da faktoj kiujn mi prezentis ĉi tie – kaj precipe rigardi fotojn, kiuj verŝajne kaŭzos la deziron ekkoni Sicilion... ■

Raffaele Pagani

EASP elektas novan prezidanton

En la lasta sabato de februaro (la 29-an) elektiĝis nova estraro de EASP por du-jara oficperiodo (2020-2021). La nuna gvidantaro de la asocio konsistas el jenaj membroj:
Estraro

Prezidanto: Esmeraldo Alencar Lima
Vicprezidanto: Paulo Sérgio Viana

1-a Sekretario: José Roberto Tenório

2-a Sekretariino: Sidnéa da Conceição Beall

1-a Kasistino: Conceição Rodrigues

2-a Kasistino: Maria Delza Macabu

Propaganda Direktoro: Genildo Martins Coelho
Konsilantaro: Audino Castelo Branco, Marcos Zlotovich kaj José Mauro Progiante;
Anstataŭantoj: Shigueco Takahasi kaj Cristóvão Rocha de Sousa.
Fruktodonan laboron al la nova estraro!
(El la oficiala retejo de nia Ŝtata Asocio). ■

Por Ĉiu Lernejano, Unu Leciono Pri Esperanto

La Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI) lanĉis interesan kampanjon: ke ĉiu lernejano en la mondo ricevu almenaŭ unu bazan lecionon pri Esperanto. En la retejo www.ilei.info oni povas trovi kompletan programon kaj vojindikojn por tia agado. Oni povas labori je loka, urba, landa niveloj, je ĉiuj lernogradoj.
Kiu transdonu tiun lecionon? Ĉiu Esperantisto posedanta bazan regadon de la lingvo kaj de ĝia historio. En la reto oni trovas multajn pretajn materialojn por trafa prezento de nia lingvo. Kompreneble, la prezento estu sobra, objektiva kaj ne tro longa. Oni povas allasi flugfoliojn kaj retadresojn por plia informado.
Ni memoru, ke tia agado estas plene apogata de UNESKO, kiu en 1985 rezoluciis: "UNESKO invitas la Membroŝtatojn marki la centjariĝon de Esperanto per konvenaj aranĝoj, deklaroj, eldono de specialaj poŝtmarkoj kaj simile, kaj instigi al la enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemo kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado."
Jen agado plenumebla de ĉiu ordinara Esperantisto.
Ek! ■

Literatura konkurso "Ĥristo Gorov – Ĥrima 2020"

LA ONDO DE ESPERANTO

Ĥristo Gorov (Ĥrima) estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson. En la konkurso povos partopreni geesperantistoj el ĉiuj landoj.

La konkurso estos por rakonto kaj eseo. Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu rakonto aŭ per unu eseo, originale verkitaj en Esperanto. La konkurso ne havas konkretan temon. La verkoj estu tajpitaj komputile kaj ĉiu aŭtoro nepre uzu la Esperantan alfabeton per supersignoj. La aŭtoroj indiku sian sekson (inan aŭ viran). La verkoj estu subskribitaj per la vera nomo de la aŭtoro, estu plena poŝtadreso, telefono kaj interretadreso. La rakontoj kaj eseoj estu maksimume 3-paĝaj; formato A4; tiparo Times New Roman (12 punktoj).

La gajnintoj ricevos valorajn premiojn.

Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 30a de septembro 2020 rete al modest@abv.bg aŭ poŝte al Georgi Mihalkov, Sofio – 1229, "Vrabnica" 1, bl. 529 vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario.

Fonto: La Ondo de Esperanto

https://sezonoj.ru/2020/03/konkurso-11

Prokrastita Kongreso en San-Paŭlo

Per virtuala kunsido, en la monato marto/ 2020, la Estraro de EASP unuanime decidis ne okazigi en ĉi tiu jaro nian Ŝtatan Kongreson de Esperanto, pro la pandemio kiu suferigas la tutan mondon. Por parte kompensi tiun malĝojigan mankon, oni intencas pliriĉigi kaj eventuale plilongigi la tradician Zamenhofan Feston, en la monato decembro. Pliajn detalojn ni sciigos dum la proksimaj monatoj al nia membraro.

La Estraro de EASP faris la ĉi-supran decidon interalie por kongrue agi laŭ la decido de Brazila Esperanto-Ligo, kiu same prokrastis la proksiman Brazilan Kongreson de Esperanto, programitan por la urbo Ribeirão Preto / SP.

Paskaj pripensoj dum la pandemio

MARIA NAZARÉ LAROCA

Ĉi-matene, kiam mi legis perrete la gazeton *Folha de S. Paulo*, min tre impresis la jena penso de la kronikisto Hélio Schwartsman:
"Ĉar estas malbono en la mondo, ĉioscia, ĉiopova kaj bonvolema dio ne ekzistas." (laŭlitere: "dio")
Kaj venis al mi multaj ideoj al la kapo...
Post la malluma Mezepoko, la periodo konata kiel Renesanco tagiĝis sur la mondo. Grava renovigo en ĉiuj scioj, kiel artoj, scienco, filozofio, kulturo, politiko, ekonomio, inter aliaj; naskiĝis tiam la tiel nomata Moderna Epoko. Ĝi estis la tempo de glorado de la homo, kiel la centro de la universo: furoris humanismo per prozo, verso kaj koloro en verkoj kaj artaĵoj de geniuloj kiel Dante, Ŝekspiro, Cervantes, Camões, Da Vinci, Mikelanĝelo ...
Malfermiĝis imperioj por navigadoj kaj malkovroj de nekonataj landoj por starigi sian socian kaj ekonomian politikan superregadon koste de la sango kaj ŝvito de la loĝantoj.
Mutatis mutandis, mi kuraĝas proponi analogion kun la malhela kaj tumultema momento, kiun la homaro, viktimo de la kronvirusa pandemio, nuntempe spertas, alpremita de nevidebla malamiko tiel detrua kiel milito.
Homoj estas subite devigitaj ĉesi kuri por havigi al si monon, kaj komencis kunvivi kun si mem per malfacila memvojaĝo al la animo.
Landoj fermis siajn limojn, tamen dank' al teknologio kaj amaskomunikiloj, ni ĉiuj estas konektitaj en izoliĝo. Tio nin savas kontraŭ frenezo.
En ĉi tiu semajno antaŭ Pasko, ni meditu pri nia spirita renaskiĝo. Kaj reprenante la penson de la supre menciita kronikisto, mi finas mian modestan artikolon per citaĵoj el du grandaj pensuloj, nome Léon Denis kaj Sankta Aŭgusteno:
"Antaŭ la vasta perspektivo de niaj ekzistadoj, el kiu ĉiu signifas batalon por lumo; ĉe tiu mireginda ascendo de la estaĵoj, kiuj supreniras de sferoj al sferoj cele al la perfekteco, la problemo pri la malbono malaperas." (Léon Denis: Post la morto: *elvolvo de la doktrino de la spiritoj*. El la franca lingvo tradukis esperanten Affonso Borges Gallego Soares. Rio de Janeiro: F. V. Lorenz, 2016, p. 106)
"Vi estas granda, Sinjoro, kaj tre inda je laŭdo; granda estas via virto, kaj via saĝo nekalkulebla. Kaj Vin laŭdi volas la homo, parteto de via kreitaro, kiu ĉie kunportas sian mortemon, kiu kunportas la pruvon de sia peko kaj la pruvon ke vi rezistas al la malhumiloj. (Sankta Aŭgusteno: Konfesoj: https://eo.wikipedia.org/wiki/Konfesoj).

Historio de la Komputiloj

GUILHERME JARDIM

Kiam vi legos la sekvantan tekston, vi eble trovos vortojn kaj esprimojn kiuj estas novaj por vi. Unue provu kompreni ilian signifon el la kunteksto – legu la saman parton je kelkaj fojoj. Kiam vi estos leginta la tutan tekston, vidu la novajn vortojn en la vortaro. La vortoj kun grasliteroj estas teknikaj vortoj.

[1] Ni rigardu la historion de la komputiloj kiujn ni konas hodiaŭ. La vere unua kalkul-aparato uzita estis la dek fingroj de la homa mano. Pro tio, fakte, ni hodiaŭ ankoraŭ kalkulas laŭ dekobloj. Tiam la abako estis inventita, ia kadro kies pecetojn oni movas tien kaj reen. La personoj daŭrigis la uzadon de abako ĝis la 16-a jarcento, kaj ĝi estas ankoraŭ uzata en kelkaj partoj de la mondo, ĉar ĝi povas esti komprenata sen la kapablo legi.

[2] Dum la 17-a kaj 18-a jarcentoj multaj personoj provadis trovi facilan manieron por kalkuli. La skoto J. Napier inventis ian mekanikan manieron por multobligi kaj dividi. Henry Briggs uzis la Napieran ideon por produkti logaritmajn tablojn uzatajn hodiaŭ. Kalkulo, alia branĉo de matematiko, estis inventita de ambaŭ matematikistoj Isaac Newton (anglo) kaj Leibnitz (germano).

[3] La unua vera kalkul-maŝino aperis en 1820 kiel rezulto de diverspersonaj eksperimentoj. Tiu maŝino, kiu ŝparis grandan kvanton da tempo kaj malpligrandigis la eblon fari erarojn, dependis de serio da dek dentohavaj radoj. En 1830 Ĉarles Babbage, anglo, projektis maŝinon kiu estis nomita “Analitika Aparato”. Tiun maŝinon Babbage montris en la “Pariza Foiro” en 1855; li neniam finis tiun laboron, sed multaj el liaj ideoj estis la bazo por la konstruado de la hodiaŭaj komputiloj.

[4] En 1930, la unua Analoga Komputilo estis kreita de la usonano Vannevar Bush. Tiu aparato estis uzita en la dua Mond-milito kiel helpo por celi armilojn. Mark I, la nomo donita al la unua Cifereca komputilo, estis finita en 1944. La respondeculo pri tiu invento estis Professoro Howard Aiken kaj kelkaj

personoj el IBM. Tiu estis la unua maŝino kiu sukcesis solvi grandan vicon da matematikaj problemoj, ĉiuj per tre rapida komputivo. En 1946 du inĝenieroj el la Universitato de Pensilvanio, J. Eckert kaj J. Mauchly, kreis la unuan ciferecan komputilon uzante pecojn nomatajn "vacuum tubes" aŭ valvon. Ili nomis sian novan inventon ENIAC. Alia grava antaŭeniro por komputiloj venis en 1947, kiam John von Newman disvolvis la ideon teni la instrukciojn por komputiloj ene de la komputila memoro.

[5] La unua generacio de komputiloj, kiu uzis valvojn, ekaperis en 1950. UNIVAC I estis ekzemplo de tiuj komputiloj kiuj kapablis fari milojn da kalkuloj sekunde. En 1960, la dua generacio de komputiloj estis disvolvita kaj tiuj kapablis fari laboron dekoble pli rapide ol iliaj antaŭvenintoj. La kialo por tia kroma rapideco estis la uzo de transistoroj anstataŭ valvoj. Dua-generaciaj komputiloj estis pli malgrandaj, pli rapidaj kaj pli fidindaj ol la unua-generaciaj komputiloj. La tria-generaciaj komputiloj ekaperis en la merkato en 1965. Tiuj komputiloj kapablis fari miliardojn da kalkulojn sekunde, kio estas 1000-oble pli ol la unua-generaciaj komputiloj. Malsame ol la dua-generaciaj komputiloj, tiuj estis regataj de etaj integritaj cirkvitoj kaj estis sekve pli malgrandaj kaj pli fidindaj. La kvara-generaciaj komputiloj nun ekalvenas, kaj la integritaj cirkvitoj kiuj disvolviĝis estas nun ege malgrandaj. Tio estas mikrominiaturigo, kio signifas ke la cirkvitoj estas pli malgrandaj ol antaŭe; ĉirkaŭ 1000 etaj cirkvitoj nun enestas en unu blato. Ĉipo estas ortangula peco el silicio, sur kiu diversaj tavoloj da integritaj cirkvitoj estas printitaj aŭ engravuritaj, poste la cirkvito estas envolvita per plasto, glazuro aŭ metalo. Kvara-generaciaj komputiloj estas 50-oble pli rapidaj ol tria-generaciaj komputiloj kaj kapablas kompletigi ĉirkaŭ 1.000.000 da instrukcioj sekunde.

[6] Laŭgrade kiel la komputika teknologio kreskas, la hodiaŭaj komputiloj povos esti malaktualaj post 3 jaroj. Oni diras ke, se la transporta teknologio disvolviĝus tiel rapide kiel komputika teknologio, vojaĝo tra la atlantika oceano hodiaŭ daŭrus malmultajn sekundojn. ■

Ĉina Radio Internacia: unu el la juveloj de Esperantujo

ALEKSANDRO PRADO

Ĉiu esperantisto konas aŭ iam aŭdis pri Ĉina Internacia Radio; per ĉi tiu artikoleto mi iomete priskribos kiom valora kaj bunta estas la radio por ni, esperantistoj. La radio internacia situas en Pekino kaj fondiĝis en 1941, sed la Esperantaj elsendoj komenciĝis en 1964. Ekde kiam mi lernis Esperanton, mi ŝatas aŭskulti la radion kvankam en tiu tempo mi ne havis oportunon aŭskulti. Nun mi trovas ĝin surrete. Tiel mi estiĝas fervora fano; krome, ĝi enhavas multe pli da beleco en Esperanto ol en la Portugala versio. Jes, la retpĝaro de Ĉina Radio havas Portugalan version kaj multajn alilingvajn versiojn.

Multe pli ol aŭskulto-praktikado, la radio donas al la aŭskultanto buntan materialon. La unua avantaĝo de la radio estas, ke la programo okazas de lundo ĝis vendredo dum unu horo. Por ni, la ĵus bakitaj programoj estas disponeblaj je la 7-a matene, nu, vi sukcesas aŭskulti la unuhoran programon aŭ parton de ĝi antaŭ ol foriri al la laboro. Kio estas en tiuj unuhoraj programoj? En la unuaj minutoj estas nelongdaŭraj kaj diversaj novaĵoj. Poste, estas aliaj nelongdaŭraj interesaj programeroj.

Per tiaj programeroj oni informiĝas pri interesaj aferoj, ekzemple: ĉu vi scias, ke estas 8 proceduroj por geedziĝo en Ĉinio? Aŭ pri la naturaj diversecoj en Ĉinio? Per la programeroj oni ekscias. Ĉu estas programeroj pri Esperanto? Jes, certe estas. Per la programero "inter ni" oni sekvas la freŝajn eventojn de Esperantujo; en la lastaj programeroj de la unuhora programo oni laŭtlegas, en la lastaj semajnoj, pecojn de Esperanta Libro: "Vivo de Zamenhof". Estas tiom da programeroj - kaj cetere ili ne ripetiĝas -, ke la tuta elsendo unuhora aspektas longa. Mi dirus ke la elsendo fluas trankvile.

Mi vigle rekomendas por la amantoj de legado la programeron nomatan "legado kun plezuro". En ĝi estas bonaj rekomendoj de libroj.

En la radio estas diversaj programeroj, kiel " Ĉina stilo", "Observo", "Tra la mondo", "Saluton Esperantujo", "Sur la

vojo". Krome, antaŭ la fino de la semajno elsendiĝas resumeto de ĉiuj novaĵoj de la semajno en la programero "Fokusoj de la semajno". La retpaĝaro elstaras ankaŭ, ĝi estas tre bunta, en ĝi estas opiniaj, bele verkitaj, artikoloj pri la nuntempaj novaĵoj en la sekcio "Akraj komentoj". Sed se vi interesiĝas pri kuirarto, oni rekomendas al vi legi la sekcion "Kuirarto". Eĉ lerni la ĉinan lingvon per Esperanto estas eble en la sekcio "ĉiutaga ĉinlingvo".

Entute, aŭskulti la radion, legi la retpaĝaron estas eniri la orientan kulturon, bone informiĝi kaj plibonigi nian lingvan kapablon en Esperanto. La redaktoroj kaj ĵurnalistoj estas tre profesiaj kaj kompetentaj. La radio estas juvelo en Esperantujo, ni tute devas apogi, kaj rekoni kiel ĝi estas profesinivela.

Referencoj:

http://esperanto.cri.cn/index.htm-

Foto: Skipo de la Radio Internacia ■

Librorecenzo

ANNA LOBO

'Aspiroj'

Aŭtoro: Lode van de Velde

Eldonejo Libera

Eldonjaro 2020

Tipo: psikologia/ polica

ISBN 978-0-244-26435-2

Paĝoj: 242

Pasintmonate, en iu trankvila tago mi estis normale ĉe reto. Mi tute ne sciis ke io ŝanĝiĝos. Do, mi vidas la afiŝon. Estas propagando de libro ĉe profila paĝo de la verkisto - Lode van de Velde estas lia nomo. Jam konektitaj ĉe socia reto, sed ne multe babilis. La nomo de la libro alvokis mian atenton. Aspiroj. 'Aspiroj al kio?' mi pensis. Kiam mi legis ke temas pri io mistera murdo, mi ege scivolemis pri ĝin legi.

Lode havas senliman kreemon, kaj bela stilo verki. La personaĝoj kaj disvolviĝo de historio estas bone pripensitaj. Ĝi vere kaptos vin, oni emas ĉiam daŭrigi por scii kio okazos. La unua ĉapitro jam estas la murdo, rapida kaj sen dramo. Post tio, iom post iom oni konstruas la kadron ĉirkaŭ la murdo, kiel reagoj kaj ĝiaj konsekvencoj.

Ĝi estas tre vereca, profunda kaj psikologia. La personaĝoj estas tre realaj, homaj. Tie troviĝas ankaŭ multaj 'AH!!! VEEEEEE' scenoj kaj ĝiroj en historio kiujn oni tute ne atendas. Tiuj estas tre interesaj punktoj en la libro. Aldone, ĝi entenas belegan humoron kaj vortludojn, kaj… Multan amoradon… Kiuj donas ĝuon al la legado. Pro tio ĉio, ĝi havas etoson acide ironia de intensaj filmoj kiel Almodovar aŭ Jodorovisky - tute ne kiel banalaĵoj por simple pasi tempon.

Mi ne volas tro pli paroli pri ĝi, ĉar mi volas ke vi mem legu kaj trapasu la sperton iri laŭ la vortoj de tiu mirinda historio. Ĉiu verkisto kaj libro markas vin, kaj eĉ se nur iomete - ĝi ja ŝanĝigas vin! Mi restis pensanta kiel estus miaj reagoj, kaj kiuj estas miaj aspiroj, plene ravigita de la sinsekvoj. Se vi estas legemulo kaj ŝatas tiajn librojn, mi plene indikas ĝin. Vi ja ne bedaŭros.

Lode Van de Velde estas esperantisto el Antverpeno, Belgio. Li aŭtodidakte lernis Esperanton en 1993, instruis la lingvon dum du jaroj en Japanio (1997-1998) kaj verkis diversajn librojn pri fotografio, pri la blisa skribo, infanlibron kaj poemaron. Li ankaŭ estas fondinto de "Eldonejo Libera" (2016). "Aspiroj" estas lia unua romano, originale verkita en Esperanto.

Se vi emas mendi la libron, vi povas per la jena reta ligilo: http://www.eldonejolibera.be/ ■

ANNA LOBO

Filmorecenzo

KAZE NO TANI NAUSHIKA （風の谷のナウシカ）



Direktoro: Hayao Miyazaki
Produktanto: Isao Tanaka
Lando: japanio
Lanĉo: 11.03.1984
Tempodaŭro: 117 min

Se estas iu kreanto de animacioj kiun mi ege ŝatas, tiu estas la japano Hayao Miyazaki. Li ĉiam kreas fantastajn, revigajn, kortuŝajn animaciojn, tre atentema al detaloj kaj roluloj.

Mi estis tre feliĉa kiam mi eksciis ke multaj el liaj filmoj aperis en Netflix. Mi fine spektis plian, kaj tute ne bedaŭras - "Nausikaä el venta valo". Ĝi estis lanĉita en 1984, per la kompanio TOEI, antaŭ la fondiĝo de lia fama studio Ghibli, kio okazis unu jaron poste.

Ĝi estas bazita sur samnoma mangao de tiu tempo. Oni povas jam rimarki trajtojn, emojn, etoson, kiuj restis en liaj sekvaj filmoj. En tiu filmo, oni akompanas princinon Nausikaä en postapokalipsa mondo, en kiu putra akvo endanĝerigas homan vivon. Ŝi estas juna, dolĉa, forta, ege kapabla por flugado, interrilatiĝi kun bestoj kaj plantoj.

Kia estas ŝia personeco kaj kiel ŝi alfrontas ĉiun defion estas ege inspirige, ĉar tio montras kiom gravas ke ni zorgu la naturon kaj kreu pli solidarecan mondon. Ĉefe pro tiu pandemia COVID-19 virusa tempo kiun ni travivas, kaj en momento kiam ni revizias ĉiun valoron de nia socio en plena komenco de 2020, ĝi iĝas ja ege spektinda filmo. Mi instigas vin malkovri la mirigan kaj revigan mondon de ĉarma knabino Nausikaä! Bonan spektadon, kaj ĝis sekva filmo! ▮

Libroj en Esperanto estas mirindaj...

vizitu...

easp.org.br/butiko

Machado de Assis

Fiere sin prezentas al la esperantistoj!

Titolo: Postmortaj rememoroj de Brás Cubas
Tradukis: Paulo S. Viana
Eldonejo: EASP, 2019
Formato: 21 cm, 248 paĝoj

Prezo: R$ 35,00

Titolo: Esav kaj Jakob
Tradukis: Paulo S. Viana
Eldonejo: EASP, 2019
Formato: 21 cm, 272 paĝoj

Prezo: R$ 35,00



Titolo: Dom Casmurro
Tradukis: Paulo S. Viana
Eldonejo: EASP, 2019
Formato: 21 cm, 260 paĝoj

Prezo: R$ 35,00

easp.org.br/butiko